

En la PDF-versio povas manki kelkaj partoj de la enhavo.

Enhavo

1	Konferencoj pasintaj.....	2
1.1	Esperanto en AILA-kongreso en Singapuro (Sabine Fiedler)	2
1.2	12-a Konferenco de Societo pri Interlingvistiko (GIL) en Berlin.....	2
1.3	Nobellaŭreato prof. Selten en milana universitato.....	3
1.4	Interlingvistikaj prelegoj en St. Peterburgo (Oksana Burkina).....	3
1.5	En Budapeŝto: Pri varieco kaj lingvouzo.....	3
1.6	En Budapeŝto: Pri naturaj kaj artefaritaj lingvoj (Blazio Vaha).....	4
2	Konferencoj okazontaj.....	4
2.1	13-a konferenco de Societo pri Interlingvistiko (GIL) en Berlin.....	4
2.2	Junaj sciencistoj kaj studentoj en Vladivostoko.....	5
3	Universitatoj.....	5
3.1	Superrigardo pri la pozicio de Esperanto en universitatoj.....	5
3.2	Esperanto en ĉinaj universitatoj.....	6
3.3	Esperanto en Etvös-Lorand-Universitato.....	7
4	Libroj kun interlingvistikaj materialoj.....	8
4.1	Pri kontrastiva semantiko.....	8
4.2	Studraporta kunsido de JEL.....	9
4.3	Scienca laboro kun efiko: El recenzo pri libro de Sabine Fiedler.....	9
4.4	Interlingvistika libro en la litova.....	10
4.5	Alan Libert: Mixed Artificial Languages.....	10
4.6	Aktoj de GIL-konferenco pri “planlingvoj kaj iliaj komunumoj”.....	13
5	30-jariĝo de PVZ de Ludovikito.....	15

1 Konferencoj pasintaj

1.1 Esperanto en AILA-kongreso en Singapuro

Inter la 16-a kaj 21-a de decembro 2002 en Singapuro okazis la 13-a Internacia Kongreso de AILA (Association Internationale de Linguistique Appliquée). La kadra temo estis “Aplikata Lingvistiko en la 21-a jarcento: Eblecoj por renovigo kaj kreativeco”. La eksterordinare ampleksa programo (900 prelegoj kaj afiŝaj prezentadoj, 65 simpozioj, 18 sciencaj komisionoj) enhavis interalie simpozion pri la temo “Lingua-franca-komunikado: Normigo kaj memregulado” sub la gvidado de *Christiane Meierkord* kaj *Karlfried Knapp* (kp. la prezenton de ilia libro en IpI 43/2.8). En la simpozio *Sabine Fiedler* prelegis pri “Normigo kaj memregulado en internacia lingvokomunumo: la kazo de Esperanto”. (Sabine Fiedler)

1.2 12-a Konferenco de Societo pri Interlingvistiko (GIL) en Berlino

37 partoprenantoj sekvis la fakprogramon de la 12-a konferenco de la germana scienca Societo pri Interlingvistiko. Ĝi okazis de la 6-a ĝis 8-a de decembro en Berlino. La kadra temo estis “Planlingvoj kaj elektronikaj medioj”. Krom pri la kadra temo oni ankaŭ aŭskultis kelkajn alitemajn prelegojn.

Jen la programo, kiu realiĝis en la germana lingvo:

<i>D-ro Rudolf Fischer:</i>	Seksneŭtraj kaj seksindikaj nomoj por estaĵoj en Esperanto
<i>Sven Siegmund:</i>	Tengwar – alternativa skribsistemo de Tolkin
<i>Prof. Klaus Schubert:</i>	Profesia perlingva laboro en industria faka komunikado
<i>Bernhard Pabst:</i>	Retrobibliografiado de artikola literaturo pri Esperanto
<i>Claus Günkel:</i>	Lingvokibernetika aksiomigo kaj prikalkulado de lern sukceso
<i>Wolfram Diestel:</i>	Kunlaborado en la interreto por ellabori vortaron
<i>Ulrich Fellmann:</i>	La interreto – rubaĵejo kaj orminejo por (lingvo-)sciencistoj
<i>D-ro Karl-Hermann Simon:</i>	„Lexicon silvestre“ sur KD
<i>D-rino Ilona Koutny:</i>	Korpusbazita leksikografio

D-rino habil. Sabine Fiedler:“ Chat“-komunikado en la interreto

D-rino habil. Cornelia Mannewitz: Sciencfikciaj lingvoj en la interreto – kelkaj ekzemploj

D-rino Věra Barandovská-Frank: La aŭlingua-projekto: planlingvoj en la interreto

La kontribuoj aperos en la aktoj de GIL “Beihefte”), kajero 9.

1.3 Nobel-laŭreato prof. Selten en milana universitato

La Nobel-laŭreato 1994 pri ekonomiko, *prof. d-ro Reinhard Selten*, la 28-an de oktobro ‘02 en la Universitato pri Lingvoj kaj Komunikado en Milano prezentis la rezultojn de sia lasta esploro pri la elmergiĝo de simplaj lingvoj en eksperimenta kunordigita ludo, asiste de la venecia sciencisto Massimo Vrangler.

Milo da studentoj, profesoroj, esperantistoj kaj diversaj interesatoj plenigis la ĉefan aŭlon de la universitato, kie inter la ĉeestantoj, krom la rektoraj moŝtoj, estis rimarkinda tiu de Eugenio Sabbatini, prezidanto de Accademia della Crusca.

(Koncizigita laŭ “Heroldo komunikas” n-ro 171)

1.4 Interlingvistikaj prelegoj en St. Peterburgo

De la 11-a ĝis la 14-a de marto, ĉe filologia fakultato de la Sankt-Peterburga Ŝtata Universitato okazis la “32-a Internacia filologia konferenco”. Estis 34 sekcioj kaj 3 'rondaj tabloj'. En la sekcio 'Aplika kaj matematika lingvistiko' estis prelego de *Vjacheslav Ivanov* pri 'Leksikostatistikaj esploroj de Esperanto: historia skizo'. En la sekcio 'Ĝenerala lingvistiko', en la subsekcio 'Sociolingvistiko' *Oksana Burkina* prelegis pri 'Portanto de la norma elparolo en Esperanto'.

(Oksana Burkina)

1.5 En Budapeŝto: Pri varieco kaj lingvouzo

La Katedro pri Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko de la ELTE-Universitato en Budapeŝto de 28.-29.10.02 okazigis konferencon sub la kadra temo “Variabilitás és nyelvhasználat [Varieco kaj lingvouzo] kun ĉ. 40 prelegoj. Prelegis pri Esperantaj temoj: *Bujdosó Iván*, *Máthé Árpád*, *Varga-Haszonits Zsuzsa*, *Wacha Balázs*. La materialo de la konferenco aperos.

1.6 En Budapeŝto: Pri naturaj kaj artefaritaj lingvoj

”Naturaj lingvoj - artefaritaj lingvoj” estis la kadra temo de hungarlingva scienca konferenco de la Universitato ELTE en Budapeŝto, kiu okazis la 10-an de decembro 2002. Ĝin kune aranĝis la Katedro Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko kaj Hungaria Esperanto-Asocio.

Oni prezentis jenajn prelegojn:

- *Ács Péter*: La norvega lingvonovigado
- *Bányai Viktória*: De la klasika hebrea al la ivrita
- *Zsilinszky Éva*: La hungara lingvonovigado
- *Gecső Tamás* : De la naturaj lingvoj al la artefaritaj lingvoj
- *Füssi Nagy Géza*: Lingvonovigado en Nigra Afriko
- *Hegyí Ildikó*: Ĉu la cigana lingvo estas kreola?
- *Vladár Zsuzsa*: La latina lingvo en la eŭropa kulturo
- *Császár Pálma*: Esperanto - mia patra lingvo
- *Dudich Endre*: Spertoj de plurlingva tradukisto
- *Haszpra Ottó*: Esperanto kiel scienca lingvo
- *Varga-Haszonits Zsuzsa*: Naturaj lingvaj elementoj en la artefaritaj lingvoj
- *Princz Oszkár*: Ĉefaj etapoj - kiel fariĝis Esperanto vivanta lingvo

La prelegoj aperos en aparta volumo.

(Laŭ Blazio Vaha)

2 Konferencoj okazontaj

2.1 13-a konferenco de Societo pri Interlingvistiko (GIL) en Berlino

La germana Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik e.V., GIL) okazigos sian 13-an fakan konferencon de 21.-23.11.2003 en Berlino. La kadra temo estos “Lingva invento, lingvo-planado, planlingvoj”. La konferenca lingvo estas la germana.

Interesatoj sin direktu al la redaktoro.

2.2 Junaj sciencistoj kaj studentoj en Vladivostoko

La 5-a Internacia forumo de junaj sciencistoj kaj studentoj okazos en Vladivostoko (Rusio) de la 23-a ĝis 26-a de Septembro 2003. Kiel antaŭe funkcios pli ol 20 sekcioj, inkluzive de historio, politiko, sociologio, lingvistiko, ekonomio, fiziko, matematiko, mekaniko, elektrotekniko kaj radioelektroniko, ŝipkonstruado, arkitekturo k.t.p.

Ekde 1997 funkcias la sekcio "Esperantologio kaj Interlingvistiko", sed la eksterlandanoj (japanoj) partoprenas ĝin ekde 1999. Plejparte temas pri la historio de Esperanto-movado en For-Oriento de Rusio kaj Orienta Azio, aplikado de Esperanto en scienco kaj tekniko kaj pri eminentuloj de la movado. La raportoj estos diskutataj esperante kaj ruse. Kio koncernas la eldonadon de la materialoj, tiuj de la lasta (la 4-a) forumo estis eldonitaj angle kaj esperante. La samon oni promesas ĉi-foje. La detalojn donas *Aleksandr Titajev* oriento@mail.ru.

3 Universitatoj

3.1 Superrigardo pri la pozicio de Esperanto en universitatoj

Jam de kelka tempo, *Germain Pirlot* strebas restarigi la liston de universitatoj kaj superaj lernejoj, kie Esperanto estas oficiale instruata. Tiun laboron li faris de 1977 ĝis 1992, sed rezignis pro tio, ke tro multaj kursgvidantoj neniam informis aŭ ne respondis al tiurilataj demandoj. Kaj tiutempe la interreto ne estis alirebla por ordinaruloj.

En 1986, la nombro iom superis 120, dum fakte ekzistis spuroj pri ekzisto de pli ol 150 tiaj kursoj, sed mankis la konfirmo, per kiu oni estus povinta havigi fidindajn kaj pli gravajn statistikojn al aŭtoritatoj aŭ al la naciaj aŭ internaciaj institucioj, ktp. Tre precizaj statistikoj kun multaj indikoj pri tiaj kursoj estas certe ne nur bonvenaj sed nepre necesaj.

Ĉio nun fariĝas multege pli facila kaj rapida per la Interreto, sed ĉu ni sufiĉe ekspluatas tiun eblecon? Do, se vi konas la ekziston de tiaj kursoj aŭ de tiucelaj klopodoj, bv interrilatigi la instruistojn aŭ instruontojn kun *Germain Pirlot* : Steenbakkersstraat 21 BE-8400 Oostende, Belgio, gampir.apro@pandora.be

Jen la stato de lia statistiko la 31-an de novembro en 2002 :

Nombro laŭlande:

Austrio: 3 - Belgio: 1 - Bulgario: 1 - Ĉeĥio: 2 - Ĉinio: 4 – Estonio: 1 - Francio: 1 - Germanio : 3 - Hispanio: 2 - Hungario: 3 - Israelo: 1 - Italio: 1 - Japanio: 5 - Korea Resp: 1 - Litovio: 2 - Meksiko: 1 – Nederlando: 1 - Pollando: 3 - Rusio: 3 ; Usono: 4 => sume 43.

Landoj : 20.

Ĉu estas nur 43 ? aŭ 80 ? aŭ 100 aŭ pli ? ... Tio estas certe la minimuma nombro. (EL Gazetara Servo de SAT-Amikaro)

Jen la valoraj broŝuroj kun indikoj pri la iama situacio :

Germain Pirlot, *Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo*, memeldono

1977 : 1-a eld., dec. 1977 [21 landoj – 58 mencioj]

1980 : 2-a eld., jan. 1981 [19-51]

1981 : 3-a eld., jan. 1982 [15-56]

1983 : 4-a eld., dec. 1983 [17-79]

1984 : 5-a eld., dec. 1984 [22-109]

1986 : 6-a eld., jun. 1986 [28-125]

1988 : 7-a eld., jun. 1988 [24-107]

1990 : 8-a eld., jun. 1988 [19-91]

1992 : 9-a eld., jun. 1992 [23-90]

Germain Pirlot, *Esperanto en universitataj medioj*, 2002 : nov. 2002 [20-43]

3.2 Esperanto en ĉinaj universitatoj

Kiel montras la suba statistiko, la informoj donitaj al Germain Pirlot pri la situacio en Ĉinio certe ne estas kompletaj. Laŭ la materialoj ricevitaj *Wu Guojiang* faris statistikon pri Esperanto en ĉinaj universitataj medioj en la pasinta jaro 2002:

En la jaro 2002 pli ol 3000 studentoj en ĉinaj altlernejoj rekte kontaktis Esperanton per partopreno en la priesperantaj prelegoj kaj kursoj. Tamen pro kelkaj kialoj (ekz. manko de E-instruistoj) nur iom pli ol 1000 aliĝintoj lernis nian lingvon. Nun 11 universitatoj aŭ kolegioj oficiale enkondukas Esperanton kiel nedevegitan studobjekton. Ili estas:

1. Heifei Industria Universitato, Anhui-provinco;
2. Beijing Lingva Universitato, Beijing (Pekino);

3. Beijing Unuighanta Universitato, Beijing;
4. Xiamen Jimei Universitato, Fujian-provinco;
5. Guanĝi Normala Universitato, Guanĝi Zhuang-nacieca Aŭtonoma Regiono;
6. Guangzhou Universitato (Guangdong), Guangdong-provinco;
7. Nanjing Universitato, Jiangsu-provinco;
8. Dalian Universitato, Liaoning-provinco;
9. Liaoning Financa Kolegio, Liaoning-provinco;
10. Xian Unuiĝinta Universitato, Shajanxi-provinco;
11. Shangdong Universitato, Shangdong-provinco.

En la supre menciitaj altlernejoj la partoprenintoj povis akiri studpoentojn inter 1 kaj 6. Esperanto-kursoj ankaŭ estis funkciigitaj en Beijing Nacia Universitato, Chongqing Universitato, Tianjin Agrikultura Instituto, Tianjin Fremdlingva Instituto, Yanbian Scienca kaj Teknika Universitato (en Jilin-provinco) kaj Xinxiang Normala Kolegio (en Henan-provinco). Specialaj prelegoj aŭ raportoj pri Esperanto okazis en Beijing Normala Universitato, Chongqing Universitato, Qiannan Nacia Instituto (en Guizhou-provinco), Sichuan Fremdlingva Instituto (en Sichuan-provinco) kaj Zhejiang Universitato (en Zhejiang-provinco). Cetere instruis Esperanton kelkaj alilandaj esperantistoj, kiuj laboras en la ĉinaj altlernejoj, ekz. Prof. Bak Giwan kaj lia edzino Kim Jongmi (Koreio), s-ro Paul Desailly (Aŭstralio).

Informis: *Wu Guojiang*, Fushun Shiyoyichang Yanjiusuo, CN-113008 Fushun Liaoning Ĉinio mikeco999@21cn.com

3.3 Esperanto en Eötvös-Lorand-Universitato

Ŝanĝiĝis la pozicio de Esperanto kiel studfako en Budapeŝto. La lingvo ne plu estas universitata fako, sed altlerneja.. Ĝi estas alprenebla de tiuj, kiuj jam havas unu alian fakon kaj jam plenumis du semestrojn. La altlernejnivela instruado daŭros 4 jarojn. Al la fako povas aliĝi studentoj sen antaŭscio de Esperanto. Ili estas akceptataj laŭ la scio de hungara lingvo kaj literaturo. Kiu scias Esperanton, tiu ne estos demandita en la priakcepta interparolo pri la hungara, sed nur pri Esperanto. Pri la instruplano informas: <http://www.extra.hu/vaganto>

Kvankam Esperanto fariĝis altlernejnivela fako, tamen la instruado daŭros 4 jarojn, kiel antaŭe. Oni eluzis la okazon kaj donos pli grandan atenton al metodologiaj demandoj kaj al la uzado de modernaj instruhelpiloj. Iom perdos el la graveco la lingvopriskribo kaj la literaturo. Interlingvistiko, lingvopolitiko restas same gravaj.

Ni ne atendas, ke ni havos multe da studentoj en la 2002/2003-a studjaro.

Ekde 2003 la fako estos elektebla jam en la unua studjaro. De tiam la plimulto el la fakoj ne estos memstare studebla. Ekde 2003 ĉiuj studentoj devos elekti du fakojn kaj unu el tiuj povos esti Esperanto. Ekzemple oni ne povos memstare lerni la ĉinan lingvon, sed kun alia fako. Ni esperas, ke Esperanto plivaloriĝos, kiel 'facila' fako.

Tian sintenon jam montris la studentoj en Hungario. En multaj superaj lernejoj oni akceptas la ŝtatan lingvoekzamenon pri Esperanto. Oni devas scii, ke ĉe ni oni ricevas diplomon nur, se la studento havas unu mezgradan kaj unu bazgradan ekzamenon pri iu ajn lingvo. La ŝatataj elektoj estas Esperanto (jare 1600 ekzamenoj), sed en la lasta tempo multaj elektas la romaan (lingvo lovari). En Esperanto la kriterioj de ekzamenado estas severe kontrolataj.

(Laŭ Iván Bujdosó)

4 Libroj kun interlingvistikaj materialoj

4.1 Pri kontrastiva semantiko

Hungara lingvistika eldonejo aperigis jenan libron, kiu ankaŭ enhavas interlingvistikajn kontribuojn:

Gecső, Tamás (2001, Red.): Kontrasztív szemantikai kutatások [Kontrastigaj semantikaj esploroj]. Tinta, Budapest.

Jen la interlingvistikaj kontribuoj:

Bujdosó Iván: Két sikeres nyelvi tervezés: az ivrit és az eszperantó fejlődésének párhuzamai [Du sukcesaj lingvaj planadoj: paraleloj en la evoluo de la ivrita kaj Esperanto] pp. 58-65.

Máthé Árpád: Az -ata/-ita probléma kialakulásának okai és történeti háttére az eszperantó nyelvhasználatban [La kaŭzoj kaj historia fono de ekesto de -ata/-ita problemo en la lingvouzo de Esperanto] pp. 311-214.

Varga-Haszonits Zsuzsa: Az eszperantó és a spanyol aktív igés szerkezetek jelentéstani egybevetése [Semantika konfronto de la aktivaj verbaj strukturoj en Esperanto kaj en la hispana] pp. 276-285.

Wacha Balázs: Ige, ragozás, idő, aspektualitás az eszperantóban és a magyarban [Verbo, konjugacio/deklinacio, tempo/tenso, aspekto en Esperanto kaj en la hungara] pp. 286-299

4.2 Studraporta kunsido de JEI

Aperis la resumoj de studraporta kunsido de Japana Esperanto-Instituto. La 18-paĝa broŝuro enhavas jenajn tekstojn:

- Por analizo de la uzo de l'Esperanta artikolo, de *Hayasi Kazuo*
- Esperantaj hajkoj japanigindaj, de *Sibayama Zyun'iti*

La broŝuro estas havebla kontraŭ 4 eŭroj (inkl. afrankon) ĉe Japana Esperanto-Instituto (JP-162-0042 Tokyo-to Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3), rete: jei@mre.biglobe.ne.jp

4.3 Scienca laboro kun efiko: El recenzo pri libro de Sabine Fiedler

La libro pri esperanta frazeologio, kiun UEA eldonis ĉijare (vidu IpI 43), baziĝas sur la germanlingva libro “Plansprache und Phraseologie” (Frankfurt/M. kaj al.: Peter Lang, 1999, 444 p., ISBN 3-631-34088-5), kiu en 1999 estis akceptita kiel habilitacia disertacio de la Universitato Leipzig. La germana originalo kaj la esperanta versio estas haveblaj per la libroservoj.

La germanlingvan verkon amplekse recenzis la internacie renoma frazeologo Wolfgang Mieder en la jarlibro pri internacia esploro de proverboj “Proverbium” (Yearbook of International Proverb Scholarship, eldonata de la Universitato de Vermont, Usono), vol. 19(2001), p. 401-407. Tie (p. 402) li parolas pri “Majstroverko...kaj ĝiaj 444 informriĉaj vojmontraj kaj bazaj paĝoj”, kiun oni “ne povas sufiĉe profunde laŭdi”. La recenzanto “nur malofte legis frazeologian studon kun tiom da streĉiteco kaj ĝojo”. Kaj li laŭdas la “kompreneblajn formulaĵojn kaj la sciencan stilon” de la aŭtorino. Ĉe la fino (p. 407) la recenzanto skribas: “Antaŭ la lego de la majstra studo de Sabine Fiedler mi sciis relative malmulton pri la fenomeno Esperanto. De la libro mi do ege multe lernis pri Esperanto kaj ĝia frazeologio, sed ja ankaŭ pri tio, kiel ĉi ĉio estas kunligita kun aliaj lingvoj. Por mi Esperanto ekde nun ne plu estas nur artefaritaĵo, sed kiel planlingvo ĝi estas ne malpli kaj ne pli ol la tiel nomataj naturaj lingvoj...Se en la frazeologia esplorkampo ekzistus iu premio por unuaranga

novstila studo, tiam Sabine Fidler estus la pinta kandidatino por la distingo. Ŝia libro ĉiukaze restos baza verko.” (El la germana trad. Detlev Blanke).

4.4 Interlingvistika libro en la litova

Fine de 2002 la universitato de SIAULIAI en norda parto de Litovujo eldonis libron de *Prof. habil. Dr. Aloyzas Gudavicius*, kiu estas prezidanto de la Senato de tiu-ĉi universitato kaj vicprezidanto de Litova Esperanto-Asocio. Li estras katedron de slavaj lingvoj en la humanisma fakultato. La libro titoliĝas "Interlingvistikos ivadas" (Enkonduko en interlingvistikon) kaj esence estas lernolibro por studentoj. La 104-paĝa libreto prezentas la kutimajn aferojn de interlingvistiko, la multlingvecon de la mondo, diversajn projektojn de internaciaj lingvoj k.s. Multe pli vaste estas prezentita Esperanto, la Esperanto-movado kaj ĝia evoluo, eĉ baza gramatiko de Esperanto, eventualaj solvoj de internacia lingvoproblemo k a. Estas kelkaj tekstoj en Esperanto. La libron recenzis la redaktoro de "Litova stelo", honora membro de UEA, Petras Celiauskas kaj docento de Vilniusa universitato d-ro Laurynas Algimantas Skupas.

Eldonkvanto de la libro - 500 ekz. Dezirantoj povas ĝin aĉeti en libroservo de UEA kontraŭ 6 eŭroj. (Litova Esperanto-Asocio)

4.5 Alan Libert: Mixed Artificial Languages

La lingvistika eldonejo Lincom Europa (München) GmbH
<http://home.t-online.de/home/LINCOM.EUROPA/> antaŭ nelonge eldonis novan libron de Alan Libert. Temas pri lia dua pri planlingvoj (pri la unua vidu en IpI 43).

Libert, Alan (2003): *Mixed Artificial Languages*. (Languages of the World 29) München: Lincom Europa, 120 p., ISBN: 3895868442, prezo USD 46.70 / EUR 44.

Jen la anglalingva resumo, kiun ni prenis el la eldoneja prospekto:

”Abstract:

Artificial languages are often classified on the basis of whether they are based on natural languages or are attempts to build a language (or at least the vocabulary of a language) "from scratch". The former type are called 'a posteriori' languages and the latter 'a priori' languages.

This is not a strict dichotomy, but rather a spectrum, and here may be no truly a priori languages. However, languages with substantial a priori and a posteriori components have been labelled 'mixed' languages.

This book is a survey of several such languages. After an introduction, there are chapters on phonetics, lexicon, morphology, syntax, and semantics. Given that these languages are partly a priori, one might wonder to what extent they conform to universals posited for natural languages, and this is examined with respect to various properties. The languages discussed include Volapuk (by far the best known and most successful language of this type), the Blue Language, Gilo, pan-kel, and Vela.”

La enhavo:

4.6 Aktoj de GIL-konferenco pri “planlingvoj kaj iliaj komunumoj”

Aperis la aktoj de la 11-a Konferenco de la germana scienca Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik e.V.):

Blanke, Detlev (Red., 2002): Plansprachen und ihre Gemeinschaften. Beiträge der 11. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23.-25. November 2001. Interlinguistische Informationen. Beiheft 8. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., A4, glubindaĵo, 163 p., ISSN 1432-3567, Prezo 15 € + afranko: mendebla ĉe UEA aŭ la redaktoro:

Enhavo:

- d-rino Věra Barandovská-Frank:* Über die Academia pro Interlingua
- Günter Anton:* Einige Bemerkungen zu Ido und zur Ido-Bewegung heute
- Prof. d-ro Otto Back:* Zur gegenwärtigen Lage des Occidental
(Interlingue)
- Ricard Wilshusen:* Die Interlingua-Konferenz in Danzig/Gdansk, Juli 2001.
Ein Bericht
- Frank Stocker:* Wer spricht Esperanto ? – Eine soziologische
Untersuchung zum Deutschen Esperanto Bund e.V.
- prof. d-ro Andreas Fritsch:* Lebendiges Latein – was ist das und wer spricht es?
- d-rino Sabine Fiedler:* „Comics, Esperanto der Analphabeten“ – einige
Gedanken zu einem 1958 erschienenen Artikel
- Andreas Künzli:* Das Projekt „Schweizer Plansprachen-Lexikon“ –
Motivation, Ziel und Sinn des Projekts
- Andreas Künzli:* Der Schweizer Beitrag zur Plansprachenbewegung –
Perioden, Fakten, Daten, Namen, Würdigung,
bibliographische Hinweise
- d-ro Rudolf-Josef Fischer:* Das Pronominalsystem in Esperanto – noch
sexusinklusiv?
- d-rino Cornelia Mannewitz:* Wer in aller Welt spricht Klingonisch?
- d-ro Karl-Hermann Simon, Horst Weckwerth, Klaus-Peter Weidner:*
Erfahrungen mit Normtermini in Esperanto – Bericht der
Terminologischen Kommission von IFRE
- d-ro Detlev Blanke:* Das Glottonym ‚Esperanto‘ als Metapher -
Eine Materialsammlung
- d-ro Seán Ó Riain:* 1Sprachplanung in Irland

5 30-jariĝo de PVZ de Ludovikito

En tiu ĉi jaro (2003) oni festos la 30-jariĝon de la serio Plena Verkaro de Zamenhof (PVZ).

Temas pri la verŝajne plej granda eldona entrepreno en la historio de Esperanto, realigita de unu sola persono.

En la jaro 1973 aperis la unua volumo de la famiĝinta “nigra serio”, eldonita de homo, kiu uzis la pseŭdonimon “Ludovikito”:

"unuaj libroj por esperantistoj",

Tio estis tole bindita, A5-formata volumo de “eldonejo ludovikito”, en Kioto, Japanio. Jen la komenco de la serio poste nomata PVZ: la Plena Verkaro de Zamenhof. Sin sekvis la eldonoj, kaj la lasta volumo estas:

"invito al ludovikologio 2" en 1997, la 26a volumo de la parto 5. Tio estas komentario de Ludovikito pri la jam aperintaj volumoj de PVZ.

Kiu estas “Ludovikito”?

Temas pri japana esperantisto kun la vera nomo *ITÔ Kanzi*. La pseŭdonimo havas duoblan signifon: *Ludoviko* (kompreneble Lazaro Zamenhof) + *ITO*, aŭ, ludovik-ito, t.e. inflamo je ludoviko, manio eĉ malsanece favora al Ludoviko.

La serio estas finita en la senco, ke la lasta volumo donis ian paŭzon, sed sed ne punkton. Se aperos eldon-mono kaj interesaĵoj dum Ludovikito vivas, la libroeldonado eventuale estos daŭrigata.

Jen la resumo de lia eldonado, kun la proksimuma sumo de la paĝoj.

I En Esperanto de Ludovikito estas redaktitaj kaj eldonitaj:

"Plena Verkaro de Zamenhof" (PVZ)

- Parto 1 (originalo):

16 volumoj, sume 5800 paĝoj,

- Parto 2 (tradukoj):

7 volumoj, sume 4200 paĝoj,

- Parto 3 (vortaroj kompilitaj de Zamenhof, aŭtografoj de Zamenhof, korespondaĵoj adresitaj al Zamenhof, ktp):

10 volumoj, sume 3000 paĝoj,

- Parto 4 (plena verkaro, nome parto 1+2+ suplementoj, tute kronologie):

3 volumoj, sume 2900 paĝoj,

La partoj 1-4 formas la t.n. "nigran serion".

- Parto 5 = Ludovikologia Dokumentaro (studoj pri Zamenhof, verkoj de siatempuloj, periodaĵoj ktp):

19 volumoj (kun mankantaj n-roj, do la fina n-ro estas 26), sume 9200 paĝoj. Ili formas la t.n. "flavan serion".

- Originalaĵo de Ludovikito:

"Historieto de Esperanto", 1988, 467 paĝoj.
Tio sume estas 56 volumoj.

II En la japana aperis el la plumo de Ludovikito:

- biografia novelo pri Zamenhof, 7 volumoj + 1 suplemento, sume 5000 paĝoj,
- aliaj pri-zamenhofaj aŭ pri-PVZ-aj libroj, 4 volumoj.

Ludovikito ne nur kolektis la materialon, grandparte financis la eldonon, faris la kompostadon ktp, li ankaŭ faris sciencajn redaktan laboron. Li havis grandegan korespondadon kun zamenhofologoj pri multaj detaloj de la verko de Zamenhof. Li ankaŭ provizis la unuopajn volumojn per tre originalaj enkondukoj kaj postparoloj. Ofte la volumoj havas indeksojn, kio plifaciligas la uzon de la materialo. Ludovikito tre modeste nomis la eldonaĵojn "kajeroj", ne volumoj. Tamen, ĉiam temas pri binditaj libroj, kiuj en eŭropa kompreno neniam estas kajeroj.

En "Informilo por Interlingvistoj" (IpI) n-ro 6-7 (1993) aperis intervjuo kun Ludovikito. (La paĝnombroj ktp. estas laŭ la japanlingva artikolo en "La Revuo Orienta", novembro 1998, kiam Ludovikito estis distingita per "Speciala honorigo laŭ Akademia Merito" de Japana Esperanto-Instituto. Adaptita kaj iom redaktita de DB laŭ kompilaĵo de SIBAYAMA Zyun'iti sibazyun@nifty.com).

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED)
ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.: ++ 49-30-54 12 633,
fakso: ++ 49-30-54 56 742, dblank.gil@snaflu.de. Mendojn oni direktu nur al UEA,
kontribuojn nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ sur diskedo. Artikoloj sen indiko
pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi
pruvekzempleron. Bibliografiatas nur viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro.
Pri CED vidu: www.esperantic.org. Materialoj ĉiam bonvenaj. ISSN 1385-2191